D. L. Armand 001.4:91

PROBLEMO DE INTERNACIA LINGVO EN GEOGRAFIO*

Geografoj laboras en du fundamentaj direktoj: landologio[1]) kaj fakaj geografiaj sciencoj.

Origina fonto de materialoj por landologiaj verkoj — estas sumita en regiona literaturo — raportoj pri grandskalaj esploroj kaj ekspedicioj, libroj pri lokaj studoj, donitoj de multjaraj observadoj, statistikaj resumoj. Uzante ĉi-materialojn, geografoj, espelorantaj sian patrion, okazas en avantaĝaj kondiĉoj kompare kun siaj kolegoj, esplorantaj fremdajn landojn. Suprecititaj materialoj en ĉiu lando, eĉ malgranda, estas publikataj en patrolingvo. Do geografoj-fremdlandistoj de unuaj paŝoj renkontas grandajn obstaklojn.

Se geografo intencas dediĉi grandan parton de sia vivo al studado de unu lando, li povas kaj devas ekscipovi ĝian lingvon. Sed tio estas rara okazo. Plej ofte sciencisto, laboranta en instituto, ricevas taskon krei la monografion pri iu lando dum tri jaroj, malofte pli multe. Nur por ellerni nekonatan al li lingvon ĝis legiveco, li devas elspezi pli ol unu jaro. Sed poste li devos transŝaltiĝi al alia lando kaj denove elspezi la tempon por studado de alia lingvo. Por levigo de produktiveco kaj rapidigo de eldonoj pluraj aŭtoroj abstinas de ĉiu ĉi turmentoza procedo kaj ĉerpas materialojn el »duaj manoj« — eseoj de eksterlandaj vojaĝantoj, gvidlibroj, specialaj priskriboj por turistoj kaj pli fruaj revuaj verkoj. En ĉieldonoj ofte renkontiĝas arkaikaj kaj direkte malveraj sciigoj, kiuj pro neatingeblo de prafontoj dum dekjaroj migras el libro libron.

Mi citos ekzemplon el mia propra sperto. Unua foje, ricevinte la taskon skribi libron pri naturo de Rumanio, mi elspezis unu jaron por ellerni rumanan lingvon. Plue dum du jaroj mi skribis pri donita temo du librojn kaj broŝuron kaj poste ne uzis rumanan lingvon dum 16 jaroj, certe, plene ĝin forgesinte. Tuj post Rumanio mi ricevis la taskon skribi scienca-popularan libron pri insulo Hokajdo. Lerni por ĉi-celo japanan lingvon ne estis racie. Do mi verkis kompilan libron helpe eksterlandaj fontoj. Ĝi okazis nesolida. Mi ankoraŭ ĝin ne finis, kiam estis devigita skribi pri Ĉinio, kaj lingvaj turmentoj rekomencis.

Ne tiel akre sentas la lingvajn malfacilaĵojn geografoj, laborantaj en dua direkto — pri teoriaj problemoj, fizika-geografiaj procezoj, paleogeografio, fakaj geografiaj sciencoj. La kvanto de lingvoj, en kiuj publikiĝas verkaj pri ĉi-tiuj fakoj, estas limigita, sed ĉiam kreskas. Krom kvar ĉefaj eŭropaj lingvoj multaj verkoj pri paleogeografio aperas en sveda kaj pola, pri erozio — en ĉina kaj japana, pri agrogeografio — en itala lingvo ktp. Pro nescio de necesaj lingvoj

---

Pro diversaj cirkonstancoj, la du artikoloj de D-ro D. Z. Armand eniris la presigon sen la lingva kontrolo.

[1]) Landologio — parto de geografio, dediĉita al kompleksa esploro kaj priskribo de apartaj landoj.

(sed ellerni ĉiujn estas neeble) sciencistoj ofte duobligas jam prilaboritajn temojn kaj postrestas sur vojo de scienca progreso.

Laŭ karaktero de sia laboro geografoj devas ofte vojaĝi eksterlandon. Ekzemple, multaj sovetiaj sciencistoj, laborantaj en geografia grupo de sciencoj, partoprenas en esploroj de naturfontoj kaj projektado de planoj de transformado de naturo en socialismaj kaj ekskoloniaj landoj. Geografiaj, geologiaj, pedologiaj esploroj antaŭiras al multaj konstruadoj, kiuj sovetiaj organizaĵoj plenumas laŭ kontraktoj eksterlande. En pluraj landoj sovetiaj fiziko — kaj ekonomiko-geografoj konsultas laborojn pri regionado. Plenumo de ĉiuj-ĉi taskoj sen scipovo de loka lingvo estas sufiĉe malfacila. Specialistoj de teknikaj kaj aliaj »urbaj« fakoj pli facile eltenas nescion de lingvoj, ĉar ili laboras en grandaj centroj kaj interrilatas plejparte kun lokaj intelektuloj, sciantaj fremdajn lingvojn, kaj ne bezonas kolekti materialojn en profunda provinco.

Kiome eksterlandaj geografoj ankaŭ interesiĝas pri nia lando, ni akceptas eksterlandajn kolegojn pli ofte, ol reprezentantoj de multaj aliaj sciencoj. Fine, ĉiam kreskas kvanto de internaciaj geografiaj kongresoj, konferencoj, simpozioj. Ilia preparo estas tre komplikita kaj postulas multajn klopodojn. Ĉiuj raportoj devas esti tradukitaj anglan aŭ francan lingvojn, kiuj ĝenerale estas solaj oficialaj lingvoj de internaciaj renkontoj. Kvankam plejmulto da raportontoj povas legi en tiuj lingvoj, nur malmultaj povas traduki al ili siajn raportojn en sufiĉe regula formo. En ĉi-rilato sovetiaj sciencistoj tute ne estas escepto. Plej ofte oni komisias traduki raportojn al profesiaj tradukistoj, kiuj malbone komprenas ilian specialan enhavon, do sublasas sencajn kaj terminajn erarojn.

Anatol Frans skribis, ke traduko disiĝas de originalo same, kiel inversa flanko de brodaĵo de ĝia vizaĝa flanko. Kaj italianoj havas proverbon: »traduttori — traditori« (tradukistoj — perfiduloj).

Obstakloj en scienca kaj praktika laboro de geografoj, dependantaj de multlingveco, povas plej bone esti dissolvitaj per vasta apliko de esperanto. Tamen, malgraŭ ekzisto de grandega esperanta litera, turo kaj plurfoja kontrolo de ĝia aplikeblo en internaciaj kongresoj, ekspeedicioj, turastaj vojaĝoj ktp. esperanto estas ankoraŭ ne fine facetita por ĉiurilata apliko en geografio. Apliki ĝin oni povas jam nun, tamen oni devas pienumi pluan grandan luboron por transformi ĝin en perfekta ilo, kontentiganta ĉiujn bezonojn de geografia scienco. Nome ekzistas du mankoj, kiujn geografoj-esperantistoj devas likvidi unuavice. tio estas: malesto de terminaroj kaj de klaraj reguloj de transkribo de geografiaj nomoj.

Kreado de sciencaj terminoj faciliĝas pro vasta Vortkreivo de esperanto. Kvankam vortoj en ĉi-lingvo konstruiĝas el pretaj radikoj kaj afiksoj kun difinita senco, kelkiam la sama koncepto povas esti esprimita diversvoje. Se pluraj sciencistoj sen reciproka konsento prilaboros terminaron de sama fako, nepre ekaperos superfluaj sinonimoj, rubantaj leksikon de lingvo, malfacilantaj legadon de sciencaj verkoj. Paraleleco povas aperi ankaŭ en okazoj, kiam pro manko de necesaj radikoj oni devos enigi la novajn, pruntepreniitajn el iu nacilingvo.

Malfacilaĵoj renkontiĝas dum enigo de novaj konceptoj iun ajn lingvon. Esperanto havas avantaĝon: en ĝi ekzistas la ebleco organizi samfojan kompiladon de terminaroj komplete por tutaj fakoj de scienco, garantiante logikecon kaj harmoniecon de sistemo de terminoj. Male, en nacialingoj pliriĉigo per terminoj fluas laŭgrade kaj senorde; ĉiu aŭtoro adaptas ilin laŭ sia purdento, ne, ĉiam tro saĝa. Rezulte aperas duoblaj, diskutindaj aŭ sensencaj terminoj.

Embrioj de geografiaj terminaroj jam ekzistas; ilin prilaboras geografoj-esperantistoj en Bulgario, Francio, FRG. Ĉiuj ankoraŭ- en stato de manuskriptoj. Apartaj geografoj komencis labori ankaŭ en USSR, tamen ĝis nun ili limigas sin per kolektado kaj surslipigo de terminoj, jam uzataj en esperanta literaturo. Mi opinias, ke en plena amplekso ĉi-laboro estas nelevebla por soluloj. sed ĵus aperis kuraĝiga ekzemplo- komenta meteologia vortaro, presita en Jarlibro 1961,

Estas necese organizi la kolektivon da aŭtoroj, dividinte ĝin je laborgrupoj laŭ fakoj, tiel ke en ĉiu grupo laboru 2—3 homoj. Antaŭe oni devas tralegi ĉiun ekzistantan en esperanto geografian literaturon kaj ĝeneeralajn vortarojn por konsideri jam rotaciantajn en ili terminojn. Poste oni devas komponi vortliston. Tiu tasko faciliĝas dank'al eekzisto en USSR de Konciza geografia enciklopedio, kies vortliston oni povas akcepti kiel bazo, elkludinde[1]) el ĝi proprajn nomojn. Plue oni devas alprovi al la vortlisto ekzistantajn terminojn, ŝanĝi fuŝtaŭgajn kaj aldoni mankantajn.

Unuavice oni devas komponi nacia-esperanta-komentajn terminarojn. Nacia-esperanta parto permesos al aŭtoroj de nacio-komponinto ksribi resumojn kaj plenajn artikolojn en esperanto. Komenta parto, t. e. klarigo de esperantaj terminoj en esperanto, permesos al eksterlandaj geografoj alŝalti al jam preta nacia-esperanta terminaro tradukojn al siaj lingvoj. Tielmaniere oni evitos ekeston en diversaj landoj de paralelaj (kaj, certe kontraŭdiraj) geografiaj terminaroj.

Problemo pri transskribado de geografiaj, kaj ĝenerale propraj, nomoj en esperanto ne estas ĝislaborita. Tamen, mi ĝin ne diskutos ĉi tie, ĉar mi dediĉas al ĝi apartan artikolon. Rimarku nur, ke problemo de transskribo de propraj nomoj koncernas ĉiujn esperantistojn kaj ne povas esti solvita sen komuna konsento. Sed por geografoj ĝia solvo estas necesega kiel pano, kiel aero. Nun Esperanta akademoi kaj IGA kreis Komisionon pri transskribo de geografiaj nomoj, sed ĝi laboras malrapide; konkretaj proponoj, fortigitaj per literaturaj ekzemploj kaj mapoj, povas multe al ĝi helpi.

Samtempe kun ĝislaboro de nesolvitaj lingvistikaj problemoj, oni jam nun devas komenci efektivigon de unuavicaj praktikaj mezuroj por enigo de esperanto geografion. Enigi ĝin oni devas laŭetape.

Unua paŝo — pligrandigo de kvanto de geografoj, scipovantaj esperanton. Kie ekzstas grandaj kolektivoj de geografoj estas racie organizi specialajn kursojn ĉe fakultatoj, institutoj aŭ fakoj de geografioj societoj. Kie geografoj dezirantaj lerni esperanton, estas malmultaj, ili povas aliĝi al ĝeneralaj kursoj, organizataj en sciencaj kaj profsindikataj kluboj ktp.

Ekde en urbo akumulas la grupo de geografoj, scipovantaj esperanton, estas dezirinde organizi prelegejon. Evidente, pli reale paroli pri kreado de ĝeneralaj sciencaj prelegejoj, kiel ĝi estas ĵus farita en Hamburg, kun enkludo en ĝian programon de geeografiaj temoj. Ekzemple ripetante lecionojn pri diversaj temoj dufoje ĉiumonate, oni devas 3—4 lecionojn ĉiujare dediĉi al geografiaj. temoj Lecionoj devas havi sciencan-popularan karakteron, por ke ilin kun intereso aŭskultu homoj de diversaj specialecoj, dezirantaj ne nur perfektiĝi en esperanto, sed ankaŭ larĝigi sian klerecon. Tre grave, ke studado de lingvo efektiviĝu en kurso de ĝia uzado helpe de interesa materialo. Ĝenerala formo de niaj kunvenoj, kie esperanto estas memcelo kaj diskutado turniĝas ĉirkaŭ demandoj de organizado, propagando kaj informado, malmulte helpas al enigo de esperanto praktikon de scienca laboro. Ĉi-lastaj demandoj ankaŭ devas esti pridiskutataj, sed nur kel suplemento al raporto aŭ leciono, kiuj estas interesaj en si mem kaj estas tralegataj ne »por«, sed »per« esperanto. Tre valore, ke okaze de vizito al urbo, kie ekzistas prelegejo, de eksterlanda esperantisto, sperta en iu ajn fako. oni petu lin tralegi ekstervican lecionon. Legado, aŭskultado kaj diskutado de licionoj fariĝos lernejo de estonta ĝia apliko ĉe internaciaj sciencaj kongresoj.

Dua ankoraŭ pli grava kaj jam maturita apliko de esperanto, estas anotaciado de geografiaj libroj kaj artikoloj. Enkonduko de esperanto, kiel lingvo, komune akceptita por ĉi-celo, estas oportune kunigi kun ŝango de tekniko mem de anotaciado. Estas racie presi resumojn en gazetoj ne post ĉiu artikolo, sed ĉe la fino de ĉiu kajero, sur apartaj paĝoj. Ĉiu resumo estas enkadrita en standartan rektangulon. Sur ties unu flanko estas presitateksto en esperanto (por eksterlandanoj), sur alia — en patralingvo (por kunpatrianoj). Se enhavo ne enŝoviĝas unu kadron, ĝia fino povas esti sekvita en la najbara. En gazeto de komunaj. dimensioj, kiel »Geografia revuo« oni povas dislokigi 4 kadrojn, proksimume 11 ×6 cm, en gazetoj de etaj dimensioj, kiel »Scienca revuo — nur 3. Elspezo de foliaro ĉe tiu ĉi sistemo estas neglektebla, profito do — grandega. Dulingvajn resumojn oni deevas presi ankaŭ en libroj.

Ĉiu sciencisto havas sliparon de libroj kaj artikoloj pri interesantaj lin temoj. Ĝenerale li surskribas sur ilin nur nomon de aŭtoro, titollon kaj jaron, sed iuokaze ankaŭ kompendias koncizan enhavon sur inversa flanko de slipo. Sed por tio li devas tuj tralegi ĉiun libron. Kompono de sliparo forprenas multe da tempo; legebleco de anotacioj dependas de skribmaniero; ne ĉiu povas legi proprajn skribaĵojn. Uzante supreproponitan metodon, sufiĉas nur eltondi pretajn, akurate presitajn kadrojn-slipojn el iu-ajn eldono kaj dislokigi en fakoj de sliparo.

Skribi la resumojn devas aŭtoroj mem, tio estas la garantio de ekzakteco kaj enhavozo de teksto. Dekomence traduki tekston al esperanto oni ofte petos aliajn personojn, tamen, kiome la avantaĝoj de sistemo estas klarvideblaj, aŭtoroj, kiuj ĝenerale mem legas gazeton, en kiun sendas siajn verkojn, baldaŭ ellernos facilan arton komponi resumojn en ambaŭ lingvoj.

---

1) **Elkludi, enkludi** — proponataj neologismoj. anstataŭ nelogikaj kaj etimologie defektoj **inkluzivi, ekskluzivi, ekskludi.**

Facile prezenti al si, kielgrade priskribita sistemo faciligos kaj simpligos tre komplikitan kaj multekostan laboron de eldonejoj kaj institutoj, nun sin okupantaj per scienca informado kaj dokumentado. Iliaj fu-nkcioj konciziĝos ĝis mendoj al redakcioj de gazetoj bezanatan kvanton de folioj kun resumoj (kiuj, simile al apartpresaĵoj, devas eldoniĝi ankaŭ dise en suplementaj peskvantoj), ties distondo, disspecigo laŭ temoj kaj dissendo al institucioj kaj personoj, abonintaj difinitajn temojn, aŭ al preparado de fotokopiaj, broŝuritaj serie. Pretaj slipoj ankaŭ faciligos laboron de bibliografiaj revuoj kaj bibliotekoj. Plenajn tradukojn kaj mezan formon-referatojn estas racie plenumi en la samaj informaj institutoj nur post ricevo de mendo kun cito de slipnumero. Opiniende, la kvanto de referitaj verkoj pro ekonduko de ĉi-sistemo ege konciziĝos.

Internacia signifo de proponita sistemo estos plej granda, se ĝi estos realigita samtempe en pluraj landoj laŭ reciproka interkonsento.

Dua etapo de enigo de esperanto geografion, kaj sciencon ĝenerale, akceptos la formon de transiro al publikado de libroj, artikoloj kaj mapoj direkte en internacia lingvo kaj ĝia deklaro oficiala lingvo de kongresoj, t. e. transdono al ĝi de funkcioj, kiujn dum jarcenetoj plenumis, sed nun jam plenumi ne povas, latina lingvo.

D. L. Armand

413.11'408.92 : 526.8

TRANSSKRIBO DE GEOGRAFIAJ NOMOJ EN ESPERANTO KAJ ĜIA UZO POR ORDIGO DE NACILINGVAJ TRANSSKRIBOJ

Problemo de transskribo de geografaj nomoj estas pli signifoza ol ĝi ŝajnas al multaj esperantistoj. Ordigo de geografiaj nomoj povas ne nur helpi al plibonigo de esperanta literaturo kaj plifaciligo de interkompreno de samdeanoj, sed ankaŭ starigi pli vastajn celojn. Solvo de ĉi-diskutata problemo povas kaj devas helpi al geografoj perfektigi geografiajn verkojn kaj mapojn, eldonatajn nacilingve en diversaj landoj.

Estas vaste konate, ke transskribo de geografiaj nomoj ĉie estas malfacila problemo. En maniero skribi fremdlandajn nomojn kaj nomojn de popolminoritatoj reĝas haoso. Fremdaj nomoj, precipe transskribataj el alialfabetaj lingvoj, estas kripligataj tielgrade, ke, legante eksterlandan mapon, homoj ne povas ekkoni eĉ la nomon de sia propra urbo.

En multaj landoj laboras specialaj Komitatoj pri transskribo de geografiaj nomoj, plenumantaj egan laboron. Se ni supozos, ke tiuj nomoj estas uzataj en verkoj kaj mapoj de 100 diverslingvaj popoloj, lingvistoj devas komponi 100 × 99 =9900 tabelojn kaj instruktaĵojn por transdono de fonemoj (literoj, kombinaĵoj de literoj kaj diftongoj), de unu lingvo per rimedoj de ĉiu alia. Terura tasko!

Nun imagu ke estos kreitaj 100 tabeloj kaj instruktaĵoj por transskribado de nomoj el la samaj nacilingvoj esperanton kaj tiom

ĉi — el esperanto nacilingvojn. Tio elĉerpjgas problemon. Uzante eseperanton kiel interspaca lingvo-peranto, ni ebligos koncizigon de nombro de transkribtabeloj de 9900 ĝis 200. Esperanta transskribo servos modelo kaj ilo por transskribo de nomoj el unu nacia lingvo al alia. Vere saviva helpo, kiun alte taksos niaj kolegoj en ĉiuj landoj! Sed esperanto bedaŭrinde ankoraŭ ne estas preta ĝin okazigi ĉar ĝia propra transskribo estas en ĥaosa stato.

Mi estas certa, ke ordigo de geografiaj nomoj ne povas efektiviĝi sen kaj dise de ordigo de ĉiuj aliaj propraj nomoj. La reguloj devas esti komunaj. La tasko de Komisiono por ordigo de geografiaj nomoj, fondita ed Esperanta Akademio kaj IGA, devas esti larĝigita ĝil la ordigo de transskribo de ĉiuj propraj nomoj.

Estas necese kaj logike akcepti kiel bazo jenajn du fundamentajn principojn: 1) por proprajn nomojn ni devas uzi nur esperantan alfabeton kaj ortografion; 2) esperanta skribmanjero devas plej proksime transdoni la nacian sonadon de propraj nomoj.

Ni devas decideme elimini el propraj nomoj latinajn du q, w, x, y, Rusaj, bulgaraj, grekaj, japanaj, arabaj esperantistoj povas absolute nescii, kiel oni devas ilin prononci, same kiel okcidenteŭropaj esperantistoj povas nescii, kiel prononci, rusajn literojn ъ, з, щ, э ktp. Scipovo de franca aŭ angla lingvo en ĉi-okazo al ni nur malhelpas, ĉar ekzemple, »x« ne en ĉiuj lingvoj prononciĝas kiel »ks«. En Latinamerika hispana oni prononcas ĝin kiel »ĥ« (Mexico = Mèĥiko), en nova ĉina alfabeto — kiel »s« mola Xue=Sjùe). Mi vidas »x« ankaŭ en portugala, indoneza vietnama tekstoj, sed mi ne scias kiel ĝin legi. Kiam geografiaj kaj personaj nomoj de ĉiuj-ĉi popoloj estas enŝovataj esperantan tekston en nacia transliterado, neniu esperantisto povas legi ĝin laŭte. Ĉu tio estas normale? Propra nomo ankaŭ estas vorto kiun oni devas ne nur percepti okule kiel simbolo, sed ankaŭ prononci buŝe.

Neprononceblaj estas ne nur fremdaj literoj, sed ankaŭ ĉeestantaj en nesperanta alfabeto, se ili en propraj nomoj legiĝas alimaniere, ol en esperanto. Ĉu diverslandaj esperantistoj scias, ke nomo de franca urbo, skribata **Rouen** oni devas legi proksimume — Ruàn, aŭ anglan. **Scarborough — Skàbro?** Same en personaj nomoj. Mi, ekzemple, ne scias naciecon de pluraj famaj esperantistoj, do mi ne povas tralegi iliajn nomojn. Ĉu s-no **Haudebine** estas anglino kaj ĝia nomo legiĝas — **Haodibajn** aŭ francino **Odebin?** Kiel prononci la nomon de s-ro **Auld?** Ĉu **Od, Old, Aud?** De angla ortografio ni kutimis atendi surprizojn.

Absurda, nekomprenebla kaj malegaleca sistemo de transliterado de propraj nomoj el latinskribaj lingvoj, dum multaj dekjaroj kripliganta esperantan literaturon, estas honto deEsperantujo, kiu vane fanfaronos pri logikeco de sia lingvo ĝis ne elviŝos tiun maldecan makulon el suno de sia gramatiko.

En rusa lingvo 44% da literoj koincidas kun esperantaj per formo kaj 16% — krom tio per prononco. En angla lingvo koincidas kun la esperantaj per formo 85% de literoj kaj per prononco — 50%. Diferenco estas nur kvanta, ne principa. Sed rusaj nomoj estas ĉiam transskribataj foneme, tamen anglaj neniam. Anglaj samideanoj tre etoniĝus, evidinte en esperanta teksto anstataŭ bonekonata nomo **Kijev**